

Numero: 260.
Januaro: 2014.

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Salut' nova jaro 2014!

Kion diri pri la nova jaro? Estas malfacile nun diri, kio okazos al ni post kelkaj monatoj. Ĉu ni ĝojos aŭ malĝojos? Mi ne scias. Vere ni ŝatus koni, kion alportos por ni la estonto? Sed tio ankoraŭ estas sekreto. Ni nur povas esperadi, ke la jaro 2014 estos paca kaj trankvila. Nin, eĉ la tutan terglobon evitos militoj kaj la homaro vivos en paco. Tero estos la paradizo por ni, homoj. Blankuloj, nigruloj, flavuloj, ruĝuloj ni kune agados, kaj ni igos gigantan florgardenon de nia planedo. Pro religioj ne erupcios militoj. Fine ni trovos la komunan vorton, kiu gvidos nin al paca kunvivado.

La celo de la tuttera esperantistaro: vivi en harmonio unu kun la alia. Ja, ofte pro la diversaj lingvoj estas gravaj miskomprenoj. La naciaj lingvoj malfaciligas la homan interkompreniĝon. Ni ne kredu al falsaj profetoj, kiuj predikas, ke naciaj lingvoj estas kapablaj solvi tiun ĉi problemon, kaj en la mondo jam ekzistas nacia lingvo, kiu plenumas bonege tiun ĉi rolon, kaj la homaro ne bezonas Esperanton.

Fakte la zamenhofa lingvo ne estas eliksiro. Sen lernado oni ne povas uzi ĝin.

Mi garantias, kiu ellernas Esperanton, tiu povas uzi ĝin tiel, kiel aliajn lingvojn tra la tuta mondo. Per ĝi oni povas trovi geamikojn. Lla scio de la internacia lingvo plifaciligas la eksterlandajn vojaĝojn.

Esperanto estas ofte atakita, ke per ĝi oni ne povas labori, studi eksterlande.

Tio estas fakto. Kial plibeligi la situacion kaj vidigi ĝin en rozkoloro. Ŝajne, kiu serĉas laboron eksterlande, pli profitdona scii la lokan lingvon, ol Esperanton.

Espereble iam alvenos tago, kiam nia lingvo fariĝos la dua gepatra lingvo de la homaro. Tio ne estos miraklo, se la labordonantoj devigos la scion de la zamenhofa lingvo, kaj oni komunikos per ĝi.

Laŭ mia plano kaj deziro Vesperto ekaperos ĉiumonate ankaŭ en la jaro 2014 kaj ĝi fariĝos Via ŝatata legaĵo ankaŭ en la estonto.

Mi plu atendas Viajn kontribuaĵojn, informojn, sciigojn, eĉ kritikojn, se io ne plaĉos al Vi.

Mi deziras al Vi bonegan legadon ankaŭ en la jaro 2014!

-Redaktanto-



En la vendejo

-Bonan tagon!
-Bonan tagon! Per kio mi povas servi al vi?
-Mi deziras aĉeti iun lingvon.
-Pri kiu lingvo vi pensis? Ni havas multe da naciaj lingvoj, Ĉiuj estas bonegaj. Por kio vi volas uzi la aĉetotan lingvon?
-Mi bezonas tiun lingvon, kiun mi povos uzi en multaj landoj.
-Jes mi komprenas vi bezonas mondlingvon. Tiam se vi permesas mi rekomandas al vi tiun ĉi lingvon....

-Kiel ĝi nomiĝas?
-Ĝia nomo Nacia lingvo super ĉiu alia ekzistanta komunikilo. Ĝi estas tre utila, ĉar ĝi estas uzebla ĉie en la tuta mondo.
-Ja ĝi estas la nacia lingvo de Imperio. Onidire ĝi disvastiĝis sange kaj milite.

-Ĉu tio estas problemo? Tio okazis jam antaŭ jarcentoj.
-Ĉu ĝi ne subpremas la lingvojn kaj kulturojn de aliaj malgrandaj popoloj?

-Sinjoro, ĉu vi volas aĉeti bone uzeblan lingvon en la mondo, aŭ prediki pri homaj rajtoj. Ĝis nun neniu riproĉis pro tio. Oni aĉetis ĝin, kiel la sukron. Neniu ĝenis ke tiu ĉi lingvo kiel disvastiĝis tra la mondo. Vere la novkolonistoj devis murdi multe da indiĝenoj, ĉar ili ne volis lerni la novan lingvon. Sed fine ankaŭ ili vidis, ke la nova lingvo alportis al ili pli bonan epokon kaj ili nur gajnos, se en la estonto ili uzos ĝin.

-Sed ilia kulturo.....
-Lasu tiun ĉi ridindan parolon! Kian kulturon ili havis? Mi devas ridegi. La nova lingvo donis al ili pli bonan kaj pli valoran kulturon. Nu, ĉu vi aĉetos ĝin?

-Bone, eble mi aĉetos ĝin, sed iomete mi pensados pri la afero. Oni devas ĉion detale trapensi, ĉar ĉi lingvo estos por mia tuta vivo. Mi jam ne volas aĉeti alian lingvon en mia vivo. Tiu ĉi devas servi min ĝis la tombo.

-Bone, sinjoro, trapensu la aferon! Mi pacience atendas. Voku min, se vi decidis!

-Ho, bonvolu!
-Jes sinjoro! Ĉu vi jam decidis?
-Kia lingvo estas tie malantaŭ tiu dikega vortaro? Mi ankoraŭ nenie vidis ĝin. Ĉu ankaŭ ĝi estas lingvo?

-Jes. Onidire ĝi estas Internacia Lingvo, sed mi ne tro konas ĝin. Antaŭ nelonge ĝi alvenis nian vendejon. Laŭ mi ĝi estas nur infanludilo.

-En kiu lando ĝi estas parolata?
-Onidire en ĉiu sur la tuta mondo. Sed tion mi ne kredas. Tia lingvo ne ekzistas. Ĉu ne?

-Mi ne scias. Bonvolu montri, mi volas rigardi ĝin pli poksime.
-Jen la lingvo. Mi pefere aĉetus la Nacian lingvon super ĉiu alia komunikilo, se mi elektus. Sed mi ne deziras influi vin.


-Ĉi tie estas skribita, ĝi estas internacia, neŭtrala kaj pli facile ellernebla ol aliaj naciaj lingvoj. Mi aĉetas ĝin. Kiom ĝi kostas?

-Ĝi ne estas tro multekosta. Ĝi kostas nur 99 stelojn. Ĉu vi petas?

-Jes kompreneble. Bonvolu paki ĝin!
Dum la vendisto pakis la Internacian Lingvon strange li rigardis la klienton kiu aĉetis lingvon nekonatan. Kial li elektis ĝin, la vendisto ne komprenis. Kiam la viro forlasis la vendejon li moke rimarkis:

-Anstataŭ la Nacia lingvo super ĉiu alia ekzistanta komunikilo li elektis senutilaĵon. Tra la fenestro li elĵetis multe da mono. Mi kompatas tiajn homojn. Lerni senutilan lingvon estas granda stultaĵo,

-Ŝaŝa-



La buŝo de la vilaĝo....

-Verkis: Lénárd Anna-



Mi staris ĉe la fenestro kaj tra la fenestro mi rigardis la homojn promenantajn sur la strato. Mi ĵetis rigardon al la tiktaktanta, olda horloĝo sur la muro. Mi heredis ĝin de mia avo, kiu honore estimis ĉi objekton. Laŭ li ĝi iam apartenis al nia reĝo Jozefo Francisko kaj tion li fiere diradis. Sciante tion aŭ nur tial, ĉar mia avo heredigis al mi, ankaŭ mi tre atentis pri ĝi. Baldaŭe eksterordinara sento ekregis en mi. Mia koro arde pulsadis.

Du maljunulinoj - nigre vestitaj de plado ĝis kapo - haltis por babiladi, eĉ kriegaçi.

-Ĉu vi aŭdis, kio okazis al Kati? - unu demandis signante per kapo al la fenestro.

La alia ne ekparolis tuj. Ŝi nur kapjesadis, kaj ŝi purigis sian nazon per la malsupraĵo de sia antaŭtuko.

-Nu, kion vi diras?

Ŝi ankoraŭ ne respondis, kvazaŭ ŝi estus intense pensanta, kion diri. Mi eltrovis, ŝi scias, kion ŝi deziras diri, sed pro io ĝenis ŝin en tio por ke ŝi eldiru siajn pensojn.... kaj kiel fulmo mia cerbo lumiĝis, kiel ŝi silentas.... ja ili staras ĉe mia fenestro. Ŝajne la unuan ne ĝenis tio, ĉar laŭte daŭrigis la parolon. Hodiaŭ mi estus devinta labori, kaj verŝajne estas tiu, kiu scias tion ĉi, sed mi eraris, kiel poste sciiĝis. Mi ridetis. Mi fariĝis scivolema, kio okazis al mi.... Ĝis nun ankaŭ la silentema maljunulino ekparolis. Konkurante unu kun la alia, kion parolas la vilaĝo.... Nu mi devas konfesi, la rideto glaciigis sur mian vangon. Ili ambaŭ sciis el certa informofonto, ke oni maldungis min. Nur en tio ili ne povis interkonsenti, kio estis la kaŭzo, ke mi urĝe devis forlasi mian laborejon, eĉ mi ne devis finlabori la maldungotempon. Mi tute malgajiĝis pro la aŭditaĵoj, ja mi nur ŝangis kontoron.... Eble mi ne estintus tiom kolera, se oni dirus, ke tio okazis pro la reduktigo de la laboristoetapo, sed la buŝo de la vilaĝo jam estas nur tia.....

Alvenis la poŝtisto. Li almetis sian biciklon ĉe la barilo. Ambaŭ aĉulino - pardonu min kara

leganto pro la maldeca vorto - samtempe eksilentis, kiel la viro ekpemis la butonon de la sonorilo. Laŭ mi li ne komprenis la eksterordinaran atenton, ĉar li rigardis al ili demandante. En la kaŝejo de la kurteno mi preskaŭ eksplodiĝis pro la rido. Mi kompatis la malfeliĉulon. Morgaŭ certe li estos la temo - mi pensis.... Rapide mi ordigis mian hararon, la supran butonon de mia bluzo mi malbutonumis, eĉ pro tio, ke ankaŭ morgaŭ ili povu paroli pri mi, kaj mi ekiris. Kiel mi malfermis la pordon ĉies atento fiksiĝis al mi. Mi ne atendis, ke mi estu alvenonta la pordegon laŭte mi antaŭsalutis ilin.



Mi ekokulumis al la junulo, ni ekidmetis.... Mi transprenis la sendaĵon....

Mi salutis. "Kiso" - mi diris, kaj fermis malantaŭ mi la pordegon.

-Nu, ankaŭ vi vidas.... ŝi estas hejme, ŝi ne laboras, certe estas vere, ke oni maldungis ŝin.... mi aŭdis, kiel mi paŝadis al la enireja pordo.

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-



Poezio

Poezio

AMO REGU MONDON



DUM NEĜO VEAS EKSTERE.
ARBOJ FROSTIĜAS SFERE.
MIN VARMIGAS AMO VIA,
EĈ EN MALJUNA AĜO MIA.

VINTRA NEBUL` FALINTA
PREMAS LA BRUSTON FORTE,
DUM SUN` EKLEVIĜINTA
NEBULON VIŜIS SENVORTE..

BLUA OKUL` MIN GARDAS..
EN ALTA BLUA ĈIEL`.
DUM STELOJ TREMBRILADAS,
EN SENFIN` ONI RAJDAS.

JEN , NATURO VEKIĜAS.
LUMIGITA BLANKIĜAS.
ORIENTE MATENIĜAS.
EN LA NOMO DE KRISTO
VIVU AMO ,ESPERO,
KAJ MALTRISTO!

VERKIS Miric Jadranka



Ni ĝoju
de Hendrik ADAMSON
originale aperis en *Norda Prismo*, 1956/2
paĝo 90

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo
kaj iru dancaŝe sur viv-vojo,
ĉar kantoj kaj dancoj
forigas laciĝon,
pliigas kuraĝon,
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo,
ĉu vintro, aŭtuno, por ni estu majo,
kun floroj, bordĥoroj
kun nura trilado
kaj suna brilado,
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,
ni kantu sen gajo,
kaj se eksilentos por ĉiam ni foje,
ne estu ja plendo tuj antaŭ silento,
sed kanta birdĥoro
en lasta stertoro,
ni ĝoju!

Antaŭ dek jaroj mortis la poeto de la supra poemo (muzikigita kaj aperinta en tiu formo en nia nuna numero) kaj multe da aliaj klasikaj esp. verkoj. Hendrik Adamson verkis ankaŭ en la estona lingvo; li estis rekonita verkisto en la estona literaturo. Liaj esp. prozaĵoj ne estas multaj, sed ilia realismo indikas de si mem la tutan, ĉiam kaj ĉie validan vivon. (*Aŭli* -- eld. de Literatura Mondo, *Arbarbieneto* -- aperinta en Literatura Mondo 1935/1). Sed Adamson aperas kun sia plej artisme magia virtuozecko en siaj poemoj. La instinktan kaj motivitan pesimismon de la malsana kaj mizere vivanta poeto en la ombro de la historiaj okazaĵoj en lia lando riĉigas en iu kortuŝa maniero la optimismo kaj la vivosaĝo de alta spirito.

Ferenc SZILAGYI

Por infanoj



Peĉjo ne deziras lerni



-Paĉjo, mi ne deziras iri al lernejo – diris Peĉjo al sia patro en iu mateno. – Prefere mi restos hejme kaj mi ludos kun miaj etaj aŭtomobiloj. Kial lerni? Sidi en la lernejo estas teda. Ja, mi scias ĉion necesan pri la mondo. Mi povos ekzisti ankaŭ sen lernado.

-Bone fileto mia – diris la viro. – Restu hejme kaj faru laŭ via plaĉo!

La knabeton surprizis la konsento de sia patro. Li pensis, ke en la familio erupcias granda disputo pro la ideo. Sed lia patro ne diskutis kun li, eĉ li apogis sian filon.

Peĉjo restis kuŝanta en la lito kaj li ĝuis la grandan liberecon. Ĝis tagmezo li dormetis. Poste li ellitiĝis kaj atendis la tagmanĝon. Poste komenciĝis la gaja ludado per la etaj aŭtomobiloj.

Unue ĉio estis en ordo. Liaj aŭtoj tien reen ruladis sur la planko de la infanĉambro. Peĉjo havis elektran tegrian aŭton. Ĝi estis lia plej ŝatata ludilo. Ankaŭ nun li ludis per ĝi, sed tiu ĉi malgranda aŭto neatendite malfunkciis.

Li ne komprenis, kio okazis? Ĝis nun ĝi funkciis bonege. Liaj amikoj tre enviis lin, kiam li montris al ili la ludilon.

-Paĉjo, mia elektra aŭtomobilo malfunkciis – li kuregis tuj al sia patro. – Mi ne scias, kio okazis?

-Ĉu vi ne scias? – ekmiris la viro. – Matene vi diris, ke vi scias ĉion, kaj vi ne deziras iri al la lernejo.

-Sed nun tion ĉi mi ne scias. Ĉu laŭ vi, se oni vizitas lernejon, tiam mi scias, kial ĝi ne funkcias? Ĉu mi lernus tie ankaŭ pri tio?

La patro sidigis en sian sinon Peĉjon, kaj li komencis rakonti.

-Aŭskultu kara mia: en la lernejo oni povas lerni pri ĉio. Verdire nun vi lernas nur pri bazaj aferoj. Tiu onklo kiu konstruis la unuan elektran aŭtomobilon, ankaŭ vizitis similan lernejon, kiel vi.

Se tiam li ne estus lerninta la bazan matematikon, fizikon, historion, kemion, biologion, eĉ fremdajn lingvojn, tiam nun vi ne havus tian aŭton. Ĉu vi komprenas min?

-Jes kara paĉjo, mi komprenas vin, sed mia eta aŭtomobilo malfunkcias. Kion fari?

-Morgaŭ mi portos ĝin al ludiloriparisto. Espereble li povos ripari tiun ĉi etan aŭtomobilon.

-Ĉu ankaŭ tiu onklo vizitis lernejon? – demandis mire la knabeto.

-Kompreneble, ankaŭ li devis lerni multe, multege. Unue li finis rezulte la elementan lernejon, poste sekvis multaj aliaj lernadoj. Li devis perfekte ellerni ĉiujn malgrandajn partojn de la ludiloj. Tage kaj nokte li devis lerni kaj ekzerci, por ke li povu ripari vian ludilon.

-Ĉiu homo devas lerni?

-Jes.

-Kio okazos, se mi ne vizitos lernejon?

-Vi restos malsaĝa. Kiam vi fariĝos plenaĝulo, iu knabeto vane atendos, ke vi riparu lian ludilon. Ankaŭ vi devas lerni, kaj morgaŭ iri al la lernejo. Se vi ne lernos, kaj ankaŭ aliaj infanoj ne lernos, vi restos malsaĝaj. Post jaroj neniu povos ripari la ludilojn de la etuloj.

Peĉjo serioziĝis kaj ĵetis rigardon al lia elektra aŭtomobilo. Ŝajne al li ne tro plaĉis, ke morgaŭ li devos iri al la lernejo. Post longa hezitado li elbuŝigis:

-Bone, morgaŭ mi iros al la lernejo, paĉjo.

La patro ekridetis kaj karesis la kapon de sia fileto. Fine li diris:

-Dum vi estos en la lernejo, mi portos vian elektran aŭtomobilon al la riparisto. Kiam vi hejmenvenos, vi denove povos ludi per ĝi.

-Onklo Adalberto-



Eksterteranoj

Eksterteranoj

